

Claude GACOND kun Tyburcjusz Tyblewski recenzas

Leo Tolstoj de Victor Lebrun

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.04.05

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-166/Radiokasedo-166-86-7-B-1036-Claude-GACOND-kun-Tyburcjusz-Tyblewski-recenzas-Leo-Tolstoj-de-Victor-Lebrun.mp3>

Cl.- Aŭdiĝas elsendo de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ parolas Tyburcjusz Tyblewski kaj Claude Gacond pri la libro *Leo Tolstoj de Victor Lebrun*.

TT.- Leo Tolstoj - la granda rusa verkisto kaj reformisto - mortis en 1910. Malbenita de la Ortodoksa Eklezio pro sia rilato al Dio; apenaŭ tolerita de la caro, li ĝuis popularecon, famon kaj respekton de milionoj en tuta tiama mondo. Lia verkaro - krom eminentaj romanoj kaj noveloj ni menciuj almenaŭ "Milito kaj paco", "Anna Karenina", "Renaskiĝo", "Haĝi-Murat", "Sonato de Kreutzer" - inkiuzivis dekojn da broŝuroj, kiuj pritraktis ia problemojn de la homaro. Malsato, malklero, malsanoj, maljusteco, imperieco de Ruslando - revenadis en lia verkaro per forta kaj nerefutebla argumentaro. Post lia morto aperis dekelko da rememoroj de diversaj personoj, kiuj iel rilatiĝis kun la geniulo. Aperis lia "Taglibro"; tiu de la edzino Sofia; rememoroj de la filino Tatjana kaj de la filo Ilja. Publikigis ankaŭ: la sekretario, la eldonisto, la najbaroj, la parencoj kaj aliaj, ĉar la mondo interesiĝis pri vivo de Tolstoj ĉefe post lia nerutina morto. Ni memorigu, ke en lastaj semajnoj de sia vivo li fuĝis el la hejmo en Jasnaja Poljana pro profundega konflikto kun la edzino kaj mortis en stacidometo de la vilaĝo Astapovo, kio estis grandega sensacio disfamigita far gazetoj.

Cl.- Post jardekoj ŝajnis, ke ĉiuj atestantoj de iu ajn epizodo aŭ konduto en la vivo de Tolstoj jam esprimis sian opinion. Kvankam la romanoj kaj la novelaro estas regule reeldonataj en multaj lingvoj, oni supozis, ke pri vivo de Tolstoj nenio plu estas eldonebla.

TT.- Tial veran sensacion kaŭzis libro de franca esperantisto Victor Lebrun. En la eldonejo "Plejado" de Lina Gabrielli aperis en 1978 la libro titolita: *Leo Tolstoj - la homo, la verkisto kaj la reformisto*. La sensacio evidentiĝis multfaceta. Unue, pro la persono de la rusa geniulo. En diversaj ĉapitroj de la libro estas prezentitaj la scenoj kaj cititaj la vortoj, kiuj efektiviĝis inter Leo Tolstoj kaj Victor Lebrun (tiam franca junulo, kiu edukiĝis en Ruslando kaj adoregis la faman verkiston).

Cl.- Due, la libro aperis en Esperanto, pro kio la internacia lingvo kunportis la novan ateston - ĝis nun ne konatan. Trie, al esperanta legantaro subite aperis tute nova kaj interesa aŭtoro, kies voĉo ne nur eksonis aŭtente, sed ĉefe pasie kaj per la lingvo zamenhofa.

TT.- Aŭtente, ĉar Victor Lebrun dum 10 jaroj - kun kelkaj paŭzoj - rilatiĝis kun Leo Tolstoj, komence kiel gasto kaj adepto de tolstojismo, poste kiel lernanto kaj imitanto vivi kaj ankaŭ kiel la sekretario, kiu ĉeestis diversajn gravajn momentojn en la hejmo de la verkisto.

Cl.- Pasie, ĉar tia evidentiĝis la personeco de Lebrun. Li entute ne aŭdacis iam ajn skribi pri Tolstoj, konsiderante sin tro modesta kaj sengrava. Kiam tamen li atingis sepdek jarojn, li decidis verki pri la viditaj aferoj kaj spertitaj travivaĵoj. Kiel absoluta adepto de soci-filozofiaj konceptoj de Tolstoj, li pasie prezentas kaj la verkiston kaj ĉiujn, kiuj malsamis en siaj opinioj. La libro dank'al tio pulsas per emocioj, kiuj tamen ne minacis al la racio, manifestita de Lebrun en respektenda maniero.

TT.- Ke tio okazis en Esperanto kaj krome en la lingvo minimume difektita de la postaj modernigoj, eblis pro tio, ke Lebrun lernis la lingvon en junaĝo kaj verŝajne sub influo de la verkisto mem. (Ni memorigu ĉi tie, ke Tolstoj mem ekernis la gramatikon de Esperanto dum kelkaj horoj kaj skribis leteron al Zamenhof. Li tamen ne volis proklami sin esperantisto por ne minaci al la ĵus komenciĝanta evoluo de la lingvo). Kompreninte, ke lia atesto povas havi iun signifon, Lebrun verkis la rememoron en Esperanto, en la franca kaj en la rusa. La rusan manuskripton li sendis al Sovetunio, de kie li regule ricevadis instigon kompletigi sian rememoron. La tajpaĵo franca trafis i.a. al manoj de Jean Rostand, kiu trovis la tekston valora, ĉar "...oni konservas impreson, ke oni estas intime alproksimiĝanta Tolstojon, ke oni vidis lian ĉiutagan vivadon, aŭdis lian paroladon; ke oni pli bone komprenas la internan dramon.

Cl.- Iu italo elfrancis la libron, kies unua parto aperis libroforme sub titolo "Devoto al Tolstoj". Kvankam ĝi malplaĉis al Lebrun, la tempo montris, ke ĝi estis la unua publikaĵo. Preskaŭ dek jarojn poste aperis la esperanta versio, kiun ni rajtas opinii la originala, laŭ kelkfoja ripeto de Lebrun. Gabrielli eldonis la libron kun vera pietismo kaj certigis al la grava enhavo la konvenan eldonkvaliton. Tuj post sia apero la libro vekis profundan interesiĝon de esperantistaro kaj ĝisatendis relative multajn recenzojn. Kelkaj el ili reprezentis tamen minacan antaŭjuĝadon de la aŭtoroj, kiuj riproĉis al Lebrun ĉu trouzadon de sufikso -eg, ĉu lian (eventuale la tolstojan) rilaton al Dio. La lasta afero kaŭzis eĉ polemikon en "Monato" en 1985 inter Lina Gabrielli kaj vi, Tyburcjusz Tyblewski, ĉu ne ?

TT.- Ĝuste mi poligis la libron kaj aperigis ĝin en la bonrenoma ŝtata literatura eldonejo Wydawnictwo Literackie en Krakovo. Miaj klopodoj atingi tion meritas apartan atenton; la libro estis kelkfoje forsendata al paperujoj, sed finfine ĝi surmerkatiĝis komence de 1985 kaj tuj ricevis multajn menciojn kaj kelkajn bonegajn recenzojn. Pola literatura revuo "Zycie Literackie" (Literatura Vivo) rimarkigis pri subtila interligo de Tolstoj kaj Lebrun, por kiu la verkisto estiĝis ne nur la spirita, sed ankaŭ en larĝa psika senco la patro (pro frua orfiĝo). Efektive spurojn de tiu ligo oni rimarkas preskaŭ sur ĉiu paĝo de la libro.

Cl.- Laŭ informo de Michel Duc Goninaz el Aix-en-Provence, nun pretiĝas la franclingva eldono de la libro. Ni aldonu, ke Victor Lebrun dum jardekoj loĝis proksime de Aix, en la postklostra konstruaĵo de Le Puy de Ste Reparde.

TT.- Lebrun substrekiis fiere, ke li sukcesis plene akcepti kaj realigi almenaŭ du el la gravaj principoj de tolstojismo : 1) ne kontraŭstari al malbono per malbono (perforto, krimo, klaĉo ktp); 2) vivteni sin per laboro de propraj manoj. Estas fakto, ke li restis aktiva ĝis plej lasta periodo de sia penplena vivo. Li ĝisvivis la 97-an jaron, kiam li mortis komence de septembro 1979.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Tyburcjusz Tyblewski kaj Claude Gacond. Ĝis la venonta sabato!